RATKAPTISTA KURIERO

INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 32 Kontakt: H.W.Sprick; hameln@esperanto.de ; www.esperanto.de/hameln ; Tel:05152/3425 AUGUSTO 2004

TERMINE 2004

(2. Halbjahr)

montags **19.00 Uhr,** Sumpfblume, HM

23.Aug. *(fotoj de insulo Rügen),* **6.Sep.** *(fotoj el Norvegio),* **20.Sep., 4.Okt.,** *(aŭtunaj ferioj)* **25. Okt., 1.Nov.** *(fotoj el Kreto),* **15.Nov., 29.Nov., 6.Dez., 20.Dez., 17.Jan. 2005, 31.Jan., ...** *planota ankaŭ estas: prelego pri la Universala Kongreso en Pekino kaj rondvojaĝo en Ĉinio; kaj: renkontiĝo kun la najbaraj grupoj en Hameln; pri la tagoj bonvolu legi ankaŭ la paĝon :* ***www.esperanto.de/hameln >Termine***

Esperanto-Treffen: www.eventoj.hu/kalendar.htm

2.-6.9.: BARO in Bad Münder, 24.-26.9.: Esperanto-Intensivwochenende in **Sundern** am Sorpesee; **1.-3.10. Spielewochenende in Herne**, **2.10.: EMAS-Kulturtag in Hannover**; 8.-10.10. 21. Studienwochenende in **Herzberg**; 30.10.: ANA-BEL in Halle/Saale; 6.-7.11.: Studienwochenende in Hoek van Holland, Niederlande; 3.-5.12.: **Hamburga Vintro:** Weihnachtskonzert, Stadtführung, Festessen; 10.-12.12. 22. Studienwochenende in **Herzberg**, 27.12.-3.1. **IF** Int. Festwoche in Magdeburg, 27.12.-3.1.: **IS** Intern. Woche für Jugendliche in Wetzlar; 27.12.-3.1.: **NR** Neujahrstreffen in Zell/Mosel; **2005:** 26.-27.2. Wochenendseminar in Neu-Isenburg; 11.-13.3. Intensivwochenende in Waltrop; 21.-28.3. **PSI** Frühlingswoche in Mücke (für Anfänger und Familien besonders geeignet); 23.-29.3. **IJF** Int. Jugend-Festival in Italien; 25.-28.3.: Studienwochenende in **Herzberg**; 25.-30.3. 100 Jahre Esp.-Kongress-Jubiläum in Boulogne-sur-Mer,FR, 5.-8.5. **GEK** Deutsch. Esp.-Kongress in Bad König/Odenwald; 13.-16.5.: Studienwochenende in **Herzberg**; 14.-22.7.: Baltische Esp.-Tage in Riga, Lettland; 30.-7.-6.8. **UK** in Vilnius, Litauen; 31.7.-7.8. **IJK** Jugendweltkongress in Zakopane, Polen;

Unsere Netzseite www.esperanto.de/hameln wurde seit August 2003 bereits über 600-mal besucht, unter anderem von Esperantisten aus Belgien, Brasilien, Bulgarien, Chile, Frankreich, Großbritannien, Iran, Irland, Italien, Japan, Kanada, Korea, Litauen, Malta, Niederlande, Norwegen, Österreich, Polen, Russland, Schweden, Schweiz, Slowakei, Spanien, Ungarn, Venezuela, USA.

Im Nachrichtenportal www.gxangalo.com finden sich Nachrichten zu den verschiedensten Themen aus aller Welt, so auch folgender Bericht zur Eröffnungsfeier der Olympischen Spiele in Athen (ähnlich wie auch beim diesjährigen Esperanto-Weltkongress in Peking, ein Ereignis und Ort der Begegnung, bei dem Menschen aus den unterschiedlichsten Nationen zusammenkommen, um gemeinsam friedvoll unvergessliche Stunden zu verleben):

Ateno, la olimpika urbo, ravis la mondon per lumo, akvo kaj Eroso

La grekoj bonvenigis hejmen la Olimpiajn Ludojn per sensacia sed samtempe modera festo. La inaŭgura ceremonio, kiu daŭris tri horojn kaj duonon, okazis hodiaŭ, la 13-an de aŭgusto, en la renovigita Olimpia Stadiono de Ateno (greka ĉefurbo), antaŭ 72.000 spektantoj kaj miliardoj da televidantoj. La festo komenciĝis per grupego de tamburistoj kies ritmo imitis la homan korbaton ĝis la momento kiam falanta kometo ekbruligis la kvin olimpikajn cirklojn en larĝa lago meze de la stadiono. **Niaj infanaj sonĝoj realiĝis** en la okuloj de 9-jara knabo, kiu trakrozis la lagon sur papera boato flirtigante la grekan flagon. Centaŭro, kreaĵo de la antikva greka mitologio, kiu kombinas la sovaĝan naturon de la ĉevalo kun la saĝo de la homo, pafis sagon kiu ekis serion de transformoj super la lago. Grandegaj kopioj de antikvaj skulptaĵoj disrompis anstataŭigante unu la alian dum laseraj efektoj de geometriaj figuroj unuigis antikvecon kun moderneco. **Tuj poste aperis** enamiĝinta paro, kiu omaĝis al Eroso, la iniciatinto de ĉio. Kvazaŭ ili estus Deŭkaliono kaj Pira, la greka Noaĥo kaj lia edzino, la paro interkisis en la mezo de la lago ekmovante longan serion de kaleŝoj kiuj portis figurojn kaj reprezentaĵojn de la tuta greka historio: la Ciklada kaj la Kreta periodoj, la Mikenanoj, la Klasika Epoko, Aleksandro la Granda kaj la Helenismo, la Bizanca Imperio, la Greka Revolucio kaj la Moderna Epoko. Samtempe, Eroso superflugis la figurojn interagante kun ili. La alegorio kulminis per laseraj efektoj kaj eliĝanta olivujo, la antikva simbolo de la Olimpikoj. **La malhela stadiono eklumiĝis** kiam aperis la greka flago kaj komenciĝis la parado de la 202 partoprenantaj landoj. Dum du horoj la spektantoj aplaŭdis la atletojn, kiuj svingis siajn manojn, ĉapelojn aŭ flagetojn, esprimis sian ĝojon aŭ simple... filmadis la eventojn per porteblaj vidbendigiloj. La multkolora homamaso kiu koncentriĝis meze de la stadiono atestis pri la kultura diverseco tra la mondo kaj elsendis mesaĝon de egaleco kaj paco inter la nacioj. **La islanda kantistino Bjork kantis** "Oceanion" dum sia blua robo, surhavanta desegnitan terglobon, kovris ĉiujn atletojn. Bondeziroj al la atletoj kaj la Olimpikoj ankaŭ venis el la spaco kiam oni diskonigis mesaĝon elsenditan el la Internacia Spacostacio. Reprezentanto de la atletoj recitis la olimpian ĵuron kaj ok grekaj olimpiaj ĉampionoj portis la olimpian flagon al la stadiono. Grandega ĥoro ĉantis la olimpian himnon dum la flago hisiĝis. **Tiam venis la momento** de la olimpia flamo. Nikolaos Kaklamanis, la olimpia velboata ĉampiono de Atlanto en 1996-a, estis la lasta torĉkuristo. Li supreniris la ŝtuparon al meĥanike sinklinanta torĉego kaj li signis la finon de la ceremonio ekflamigante ĝin. La atikan ĉielon lumigis miloj da artfajraĵoj. La helenoj celebris la finon de la vojaĝo de la flamo. La Olimpikoj estis revenitaj hejmen. (de Ĝangalo-redakcio, laŭ la greka korespondanto Efthimios Mavrogeorgiadis.)

Sur la fotoj vi vidas niajn ĝisnunajn gastojn en ĉi-tiu jaro: Evgeny el **Siberio**, Anatoli el **Uzbekio**, Jean-Michel el **Francio** kaj fam. Krzyzanski el **Pollando**.